

Norvega Esperantisto

N-ro 1
1993

3a periodo 60a (69a) jaro




ESPERANTOBLADET

Landa kongreso

pentekoste

en Skjeberg popola altlernejo
apud Sarpsborg



ALIĜILO p.22

Karaj legantoj!

Troespere ni lastfoje aludis novan numeron en januaro. Sed jam februaras. Januaro estas ja tempo de jarraportoj, kursoj, estraraj kunsidoj kaj ĉiaj ekspedoj, kaj via kompatinda revueto suferis plursemajnan prokrastiĝon.

Tio fontas parte ankaŭ el la daŭra manko de komputilo kaj fotokopiilo en nia oficejo post la ĉstelo en decembro. Sed finfine ni ĉjus sukcesis almenaŭ kolekti la koncernajn kvitancojn por la ĉstelitaĵoj, kaj baldaŭ povos atendi decidon de la asekura kompanio, ĉcu kaj kiom ili repagos al ni.

Eĉ se la rekta perdo de la ĉstelitaj maĉsinoj estos kovrita, restos multaj elspezetoj por telefonado kaj letterskribado lige kun la ordigo de la afero. Tial ni estas tre dankaj pro la kontribuo de nia abonanto A.L. en Francio.

Sed nun ne decas flankenĉsovi nian n-ron 1/93 plu: Jen la akumuliĝinta artikolaro almenaŭ - kvankam belaspekta la produkto ĉcifojne bedaŭrinde ne estas. Fojon post fojo ni konstatis nome, ke ĉguste la belaspektigo estas terure tempo-raba, kaj nun ni tiris la logikan konkludon de tio, kaj

primitivigis la gazeton por liberigi iom da tempo por aliaj taskoj.

Pri la kiamo de la venontaj numeroj ni ne aŭdacas promesi. (Sed vi ja rajtas esperi.) Ni antaŭvidas, ke prioritata tasko por la venontaj monatoj estos la ordigo kaj alilokigo de nia biblioteko (vd. p. 7).

DD

Alipaĝe

Bibliotekaĵoj forĵetotaj!	7
Fra valgkomiteen	5
Propono al la Landa Kongreso:	
Egaligo de kotizoj	8
La E-klubo de Murmansk	6
Vojaĝo al ĉĉho-Slovakio	10
Aranĝoj en eksterlando	12
Seminario por la	
neregistaraj organizaĵoj	14
Seminario: Minoritataj	
lingvoj en Nordeno	16
Norvega Kroniko	18
Aliĝilo por la landa	
kongreso de NEL	22
Abonu aliajn revuojn!	25
Novaj libroj vendotaj	25
Kotizoj 1993	24
Olav Thormodsen: nekrologo	27
Skribu al la radiostacioj!	28

ERARO

en Esperanto-nytt 3/92. Sur p. 1, kol.1, 4a linio de mal-supre: "118 utdrag" devas esti "369 utdrag".

La prezidanto:

Ni neniam rezignu!

Labori por disvastigado de Esperanto ofte ŝajnas senespera kaj vana afero.

En la okcidenta mondo ĝenerale la situacio nuntempe estas tia ke la angla lingvo, kaj nur tiu, estas uzata en internaciaj rilatoj - ankaŭ tie kie ĝi ne havas sian hejmlokon - kaj la homoj iom post iom kredas ke la angla lingvo estas la komuna komunikilo por la tuta mondo.

La sekvo de tio estas ĉiama alkutimiĝo al anglo-usonaj pens- kaj vivmaniero, kaj ke iom post iom precipe la mal-

grandaj popoloj perdas sian proprecon, kune kun la fakto ke en la opajn minoritatajn lingvojn enpenetras tiom da novaj vortoj el angla deveno, ke la identeco pereas.

Kiuj profitos pro tia evoluo ke internacia komerca kulturo ĉie en la mondo ŝtele enpenetras, al ĉiuj landoj, al ĉiaj etnaj grupoj kaj al individuoj?

Ni esperantistoj klare vidas la kondamnindaĵon en tiu fakto, kaj ni pli ol volonte deziras ŝanĝi ĉi tiun bedaŭrindan evoluon kaj igi la



Norvega Esperantisto

ISSN 0029-361X

ESPERANTOBLADET

DUMONATA REVUO DE
NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
NORSK ESPERANTO-FORBUND

ELDONEJO ESPERANTO A/S
ESPERANTOFORLAGET A/S

Postgiro: 0803 5100300

Postgiro: 0809 5100318

Redaktis Douglas Draper.

Telefon: 22 35 08 94

Redakcio kaj ekspedejo:

Adresse: Olaf Schous v. 18, N-0572 OSLO 5

Olaf Schous vei 18

Kontortid: mandag, torsdag 15.30-16.30
onsdag 14.30-15.30

N-0572 Oslo

Ĉefdelegito de UEA:

Tlf. 22 35 08 94

Kjell Gustavsen,

Rasmus Engers vei 10, 0956 OSLO 9

Jarabono (1993): 70 kr.

Postgiro 0808 5133293 Bankgiro 1609.08.5500.3

Ofsete presita en

Turisma Servo de NEL

Rødvedt eldresenter

ĉe Agnar Fitjar

0956 Oslo

5240 Valestrandsfossen

Tlf. 05 - 39 42 71.

Postgiro 0809 5100326

homojn ŝanĝi pensmanieron por priatenti sian proprecon, kiun ili konservu, tamen ankaŭ internacie pensante kaj agante pere de lingvo senpatruja kaj neutrala.

La problemo estas: Kiel ni atingu la homojn kun tiu ideo - kiel ĝuste kaj laŭcele argumenti?

Norvega Esperantista Fervojoista Asocio - NEFA (norvega nomo: NSB Esperantoforbund) nun donis ekzemplon kiu povas esti imitinda. Post la bonsukcesa 42a kongreso de IFEF en Hamar en 1990, kiam la tiama urbestro kaj aliaj lokaj altranguloj sur la kultura tereno eklernis Esperanton por povi kunhelpi dum la kongresaranĝo, ili sukcesis konigi kaj la urbon kaj la ĉirkaŭan regionon al la tuta mondo. Nun estas absolute ĝustatempe kaj laŭcele "forĝi la feron dum ĝi estas hejta!"

La fervojistaj esperantistoj nun alcelas fari la gubernion Hedmark la norvega Esperantoregiono.

Tiucele oni serĉis kontakton kun ĉiaj imageblaj instancoj kiuj povus kunhelpi. Tiuj estas la redaktistoj de la ĉiutagaj regionaj gazetoj, de anoncrevuoj kaj de kongregaciaj periodaĵoj, cetere la regiona TV kaj ankaŭ lokaj radioelsendejoj.

Sekve la geaŭskultantoj al Radio Hamar: 102,7 m

frekvenco dum la vintro 1992 - 1993 havas okazon sekvi elementan kurson pri Esperanto verkitan de Jon Rømmesmo.

Cetere estas bona eblo ke similan kurson sendos Radio Kongsvinger, kaj se tio realiĝos la centra kaj la suda regionoj de la gubernio Hedmark estos sufiĉe prizorgitaj, kaj neniu povos eviti konstati ke Esperanto ekzistas.

En la skriba momento mi supozas ke la Esperantoklubo "La Urso" de Sarpsborg tre verŝajne planas similan agadon en la gubernio Østfold. Se la rezulto de tiu agado unuafoje ne sufiĉos por stimuli al amasmovado, ĝi tamen tre verŝajne vekos pozitivan intereson pri Esperanto, tiel ke kelkaj eklernos ĝin.

Tiuokaze la agado de NEFA estas rekomendinda kaj imitinda por ĉiuj kluboj aliĝintaj al Norvega Esperantista Ligo, ankaŭ al izole loĝantaj membroj tie kie ne estas loka Esperantoklubo.

Vi ĉiuj nun ekkomencu agadi en via propra gubernio por diskonigi Esperanton tie!

Devas esti la plej grava tasko dum la jaro 1993 diskonigi la lingvon por ke kiel eble plej multaj eklernu kaj uzu ĝin.


Mi deziras al ĉiu bonan sukceson!

Per Johan Krogstie

PA NORSK

(formannens artikkel fra forrige side)

Formann advarer mot at vi mister motet på grunn av den engelsk-amerikanske kulturens popularitet. Det er mye som kan gjøres lokalt for å gjøre esperanto kjent. Et eksempel er å få lokalavisen eller nærradiostasjonen til å ta inn et lite kurs, slik det har vært gjort på Hamar og i Sarpsborg.



Plena adreso!

Ni memorigas, ke letero al ni en la oficejo en Oslo devas enhavi la vorton "Esperanto" ie en la adreso, alie vi riskas, ke la Po^osto resendos ĝin kun stampo "inconnu" (= nekonata). Do bv. ne skribi nur la nomon de persono kaj "Olaf Schous vei 18" ktp. Ĉar en tiu domo estas pli ol dek apartamentoj.

Fra valgkomitéen

Fra Norsk Esperanto-Forbunds valgkomité til medlemmene:

Landsmøtet holdes i år på Skjeberg Folkehøgskole ved Sarpsborg i pinsen - lørdag 29. - mandag 31. mai.

Som vanlig på våre landsmøter skal det foretas valg. Det skal velges formann, viseformann, generalsekretær, sekretær, kasserer og to styremedlemmer. Det skal også velges 3 vararepresentanter, 2 revisorer, samt representant og vararepresentant til Uhlen-legatets styre, og valgkomité med 3 medlemmer. I tillegg skal det velges 5 rådsmedlemmer, dersom ordningen med rådsmedlemmer blir opprettholdt.

For referatet fra forrige landsmøte se Norvega Esperantisto nummer 4/1991.

Har du forslag på kandidater til noen av disse nevnte verv, kan du sende dine forslag til: Valgkomitéen ved Elna Matland, Fløenbakken 41 d, 5009 Bergen. Du bør ha spurt den kandidaten du foreslår om vedkommende er villig. (At et medlem blir foreslått til et verv, betyr ikke nødvendigvis at vedkommende blir valgt. Det er landsmøtet som velger og således avgjør.) Valgkomitéen ønsker eventuelle forslag innen torsdag den 15. april.

Elna Matland

La E-klubo de Murmansk 5-jara

la 25an de februaro

Kvin jaroj ne estas longa tempo por Esperantoklubo, sed tiuj unuaj jaroj estas jaroj gravaj. En la unuaj jaroj montriĝas kian estontecon la klubo havos, ĉu ĝi kreskos, pasivos aŭ en plej malfavora kazo malfondiĝos.

La klubo de Murmansk montris vivemon malgraŭ la grandaj renversoj kiuj okazis lastatempe en Ruslando. En tiu klubo estas aktivaj membroj kiuj serĉas kontakton kun esperantistoj en aliaj landoj, precipe en la okcidento.

Gravas, ke Esperanto-kluboj kaj unuopuloj, ankaŭ en Norvegio, salutu la klubon en Murmansk pro la jubileo

ĝiaŭdon la 25an de februaro. Tiaj salutoj el eksterlando estos granda stimulo por ilia plua laboro. Tio montros almenaŭ ke ni scias pri la tiea klubo.

Prezidanto de la klubo estas Anatolij Liĉ [kiu vizitis la klubojn en Oslo januare de 1991, donacante plurajn memoraĵojn, kaj poste sendis plurajn leterojn - DD]

Adreso: 183050 Murmansk, Ab/ja 4714, Esperanto-klubo. Ĉiuj salutintoj ricevos respondon. Mi jen instigas ĉiujn samideanojn en nia lando sendi saluton okaze de la 5-jariĝo.

Herolv Olsen (tradukis DD)

Pri la E-klubo de Murmansk

Antaŭ kvin jaroj okazis du-semajna kurso pri Esperanto en Murmansk. Gvidis ĝin Elvira Gacenco, el la urbeto Volskij, apud Volgograd. Fine de la kurso estis fonda kunveno kiam naskiĝis la nova klubo. La novbakitaj esperantistoj elektis kiel prezidanton Dmitrij Bubnov [kiu poste vizitis Oslo - Red.]. Tiam komenciĝis nia Esperanta vivo, diras Aleksis Masjukas, multjara aktivulo de la klubo.

La esperantistoj en Murmansk havas nun kontakton kun la E-kluboj en la ĝemelaj urboj Groningen (Nederlando), Rovaniemi (Finnlando) kaj Tromsø.

Du Tromsø-klubanoj invitiĝis al festa kunveno de la Murmanska klubo, kiam ni vizitis Murmansk en majo 1991. (Vd. ankaŭ lian vojaĝraporton en N.E. n-ro 3/91 - Red.) La akcepto estis tutkora, eĉ kun donacoj. Ni rimarkis ke multaj el la membroj ludas iun instrument-

Bibliotekajoj forĵetotaj!

Kiel ni sciigis en decembro, ni devas trovi alia(j)n lok-o(j)n por la biblioteko de NEL, kaj forigi ĉiom el la Universitata Biblioteko antaŭ la 1-a de junio. Temas pri:

1. La libraro: minimume 40 bretometroj. Ni ankoraŭ esperas pri solvo en ekz. gubernia biblioteko, eble en Hamar. Sed se tio ne sukcesos, aŭ se nur parte, verŝajne ni devos iel trovi lokon en nia jam plenplena ejo en Sinsen.

De pluraj malnovaj libroj ni havas 3an aŭ eĉ 4an ekzempleron, kiujn ni volonte fordonos, se iu pretos pagi (igi) la transporton. 16 kilogramojn ni jam sendis al

on. Tial kantado kaj muziko feste eris en la programo.

Tiu renkonto donis al ni multajn daŭrajn memorojn. Ni estis kune kun homoj kiujn ni neniam antaŭe renkontis, tamen ĉiuj sentis sin kvazaŭ unu grandan familion.

Bedaŭrinde ne eblis por la klubanoj de Murmansk reciproki la viziton. Ordinaraĵoj rusoj kutime ne povas financi vojaĝon al eksterlando, des pli ĉar biletojn por la okcidento ili devas aĉeti per okcidenta valuto. Tamen ni esperas, ke la situacio ŝanĝiĝos, tiel ke ni povos atendi viziton el Murmansk.

Herolv Olsen (tradukis DD)

la preskaŭ senlibra movado en Argentino. La afrankon pagos la Fondaĵo Ameriko de UEA.

2. La periodaĵoj: 70 m. krom multe da duoblaĵoj. Se ne venos de iu membro - aŭ klubo - alia solvo, ni antaŭvidas ke ni devos fordoni la unuan ekzempleron al la Nacia Biblioteko en Moskva. Tio havas la avantaĝon ke oni tie eĉ katalogos ilin - por kio ni ne havas kapaciton - kaj kopioj de unuopaj numeroj mendeblas - verŝajna kontraŭ pago - tra ajna loka biblioteko. Sed ni perdos la eblon trarigardi tutajn jar-kolektojn, kaj ni neniam rajtos ricevi ilin.

Do eble ni devus konsideri konservi certajn aktualajn revuojn (sed kie?), aŭ ekz. certajn antikvaĵojn.

Ĉu vi havas deziraĵojn tiurilate?

3. Krom tiuj unuaj ekzempleroj estos multaj duoblaĵoj de revuoj, kaj diversaj malnovaĵoj, kiujn ni fine verŝajne devos nur forĵeti, se ne venos membra oferto pri ili.

4. Cetere estas amase da malnovaj turismaj broŝuroj, jarlibroj, kongresaj libroj, fotoj, kalendaroj ktp., kiujn ni tre baldaŭ forĵetos. Do se vi interesiĝos trarigardi kion ni havas, kaj eventuale transpreni (prefere mem portante), bv. kontaktigi kun mi en la oficejo.

Douglas Drape

Propono al la Landa Kongreso

Nova sistemo de aligkotizo.

Historia fono

Jam antaŭ kelkaj jaroj esprimiĝis inter la membroj de NEL deziro praktiki "egaligon de la vojaĝ-elspezoj" por la Landaj Kongresoj. Estraranoj eĉ konsideris la eblecon enkonduki tiun sistemon por la lasta kongreso, kiu okazis en Trondhejmo 1989. Sed ni lasis la aferon, ĉar ni ne volis riski la suspekton, ke "la Oslo-anoj kaptas la okazon enkonduki la sistemon por kongreso, kie ili mem havas eksterordinare grandajn vojaĝ-elspezojn."

Sed por la ĉi-jara kongreso mi trovis, ke la kondiĉoj estas tre favoraj por provi la sistemon. Unu el la tre agemaj membroj de La Urso (la E-klubo en Sarpsborg), Rolf Bergh, sukcesis havigi tre favorprezan ofertan de "Skjeberg folkehøgskole". Tie okazos ĉio: kunvenado, manĝado, logado, nur ne la ekskursado! Tiuj cirkonstancoj, mi pensis, estas idealaj por elprovi la sistemon, kaj mi faris tiurilatan proponon al la Liga estraro.

Ĝis-nuna praktiko

Por antaŭaj landaj kongresoj ni ĝenerale pagis malsame multe, depende de tio, en kia

hotelo ni volis loĝi, kiom lukse ni volis manĝi, kaj kiom longe ni devis vojaĝi. La formala aligkotizo do konsistigis nur parteton de tio, kion ni entute pagis por povi partopreni la kongreson.

Precipe por la periferie loĝantaj membroj tia sistemo devas sentiĝi maljusta diskriminacio. Dum la 35 jaroj, dum kiuj mi estas membro de NEL, la Landa Kongreso okazis nur unu fojon en Norda Norvegio. Do la nord-norvegoj kaj aliaj periferiuloj estas malfavorataj ĉiel: Unue iliaj ekonomiaj kondiĉoj ĝenerale estas pli malfavoraj ol tiuj de la "centruloj" (mi scias, ke tiu aserto estas diskutibla, sed mi ne volas deflankiĝi). Due ili ĝenerale havas malpli da ebleco kontaktiĝi kun aliaj E-istoj kaj praktiki E-on, ol la "centruloj", kiuj povas ĝui E-medion ne nur en sia propra klubo, sed ankaŭ en najbaraj kluboj. Trie ili estas malfavorataj eĉ tiam, kiam devus kolektiĝi E-istoj el la tuta lando - pro diskriminacie altaj vojaĝkostoj.

Mia propono

Ĉar ĉi-jare ni ĉiuj loĝos kaj manĝos samkondiĉe, mi proponis, ke ni postulu de ĉiuj la saman aligkotizon,

sed ke tiu kotizo inkluzivu ĉion, eĉ la vojaĝkoston! Por ke ni povu kovri la vojaĝkostojn, mi proponis, ke tiu unueca kotizo estu 800 kronoj (versajne tro malalta sumo).

Tiuj, kiuj intencis ŝpari monon, biciklante al la kongreso, manĝante kunportitan manĝaĵon kaj dormante entendo, devus ŝanĝi sian planon, kaj ili certe grumblus pri la "senmoniga" politiko de NEL. Sed por la periferiuloj la propono versajne estus bonvena. Kaj por ĉiuj ĝi estus praktika ago de solidareco, sento, kiun devus koni ĉiu E-isto. Ni, kiuj loĝas proksime kaj povas vojaĝi malmultekoste, devus kun ĝojo pagi same multe kiel tiuj, kiuj loĝas malproksime kaj ne povas vojaĝi malmultekoste, por ĝui la E-istan komunecon.

Praktikado de la egaligo de la vojaĝ-elspezoj

Mia propono ne signifus, ke NEL repagus ĉiajn vojaĝkostojn. Se mi skribus ĉi tiun artikolon norveglingve, mi dirus, ke NEL repagus "utgifter til reise på rimeligste måte". Sed kion signifas "rimelig"? Ordinare oni komprenas, ke ĝi signifas "moderpreza". Do, homo, kiu rajtas vojaĝi je reduktita tarifo per la fervojo, ne pagu la plenan tarifon nur por igi NEL'on subvencii la Norvegajn Ŝtatajn Fervojojn.

Sed "rimelig" ankaŭ povas havi signifon proksiman al "konvena". Ĉu estas "rimelig", ke homo el Alta vojaĝu unue per aŭtobusoj al Fauske kaj poste per tri trajnoj al Skjeberg, aŭ unue per ŝipo al Bodø kaj poste per la samaj tri trajnoj? Ĉu ne estus pli "rimelig", ke tiu homo vojaĝu per aviadilo al Oslo kaj poste per nur unu trajno? Evidente jes: la unuaj alternativoj implicas plurtagan vojaĝon, la lasta nur plurhoran. Kaj eĉ se la aviadila vojaĝo estas pli multekosta (kio ne nepre estas certa), ĝi ankaŭ estas pli "rimelig".

Do NEL repagus la kostojn egalajn al vojaĝo plej-eble moderpreza kaj samtempe plej-eble konvena. Se oni volus vojaĝi pli lukse ol tio, oni mem pagu la diferencon intersiaj faktaj vojaĝkosto kaj tiuj de la plej moderpreza/konvena vojaĝo.

Kaj ankoraŭ unu rezervo: la repagon de la vojaĝkosto ni povus proponi nur al la membroj de NEL. Nia ekonomio fakte ne permesus repagi vojaĝkostojn de Nov-Zelando al Norvegio!

La sorto de la propono

La estraro fakte akceptis mian proponon dum sia kunveno la 14an de Decembro 1992. Ni decidis provi la sistemon por la ĉi-jara kongreso, kaj surbaze de la spertoj gajnit-

Vojaĝo al Ĉeĥo-Slovakio

de Herolv Olsen, Tromsø

Estis nur bonŝanco ke mi vidis anoncon pri Somera Esperanto-lernejo en Poprad, Ĉeĥo-Slovakio. Samtempe mi emis viziti Esperanto-geamikojn en tiu lando. Tial mi aliĝis al kurso de 15.8 ĝis 18.8 1992 en Poprad. Mia restado en la lando daŭris preskaŭ tri semajnojn. Tiam mi parolis nur Esperanton.

Slovakia Esperanto-Asocio (SEA), kiu havas sian sidejon en Poprad kaj posedas la Esperanto-Centron, aranĝis la someran lernejon. Estis 70 litoj por gastoj. Venis turistoj dum la tuta jaro.

La centro inkludas du domojn en la urboparto Sobota, kiu estas tre malnova. Multaj konstruaĵoj estas pli ol 300 jarojn aĝaj. La plej multaj estas restaŭritaj, kaj havis novan fasadon. Unu domo de SEA estis antaŭe monaĥejo, kun metro-dikaj muroj el ŝtona materialo.

Komence mi trovis ĉion iom primitiva, laŭ nia okcidentaj kutimoj. Tamen la manĝaĵoj kaj logejoj estis sufiĉe bonaj. Nia baza bezono estis plenumita.

Fantaziege malmultekosta


estis la restado.* Por 13 tagoj ni pagis nur 3510 ĉeĥajn kronojn - ĉ. 750 norvegajn. Por unu tagnokto malpli ol 60 n.kr.! La prezo inkludis manĝon, loĝejon kaj instruadon.

Ĉe la centro estis tre taŭgaj kaj lertaj instruistoj, kiuj flue parolis kaj profunde sciis la internacian lingvon. Ili montris ardan intereson por Esperanto kaj ĝia ideo. Tial ili instruis kun vivo kaj emo. La instruado havis altan kvaliton, malgraŭ manko de modernaj pedagogiaj rimedoj.

Laŭ la plano dissendita la centro ofertis 4 alternativojn de kursoj. Sed ĉi-jare la aliĝintoj estis tre malmultaj, malpli ol 20. Tial estis nur du kursoj: A por komencantoj, B por progresantoj. Mi elektis B-kurson.

La instruado daŭris 5 horojn ĉiutage. Ni lernis parol-

* Tamen tio ŝuldiĝas nur al la kurzo, kiu estas tre malalta en nia favoro. Por la lokanoj mem la prezoj tute ne estas malaltaj, kompare kun iliaj salajroj. - Red.



adon, legadon kaj skribadon. Nia instruisto estis Petro Smedt el Belgio. Li estis edziĝinta kun japanino, kaj en la hejmo ili parolis nur Esperanton. Li sciis pli ol 20 lingvojn. Li ankaŭ estis muzikema kaj havis edukadon pri muziko. Tial ni lernis multajn kantojn dum la kurso.

Unue mi pensis ke Esperanto ne havas tiel bonan esprimkapablon kiel nacia lingvo. Sinjoro Petro havis alian opinion: Ĉiujn pensojn oni povas esprimi en Esperanto, pli klare kaj logike ol en iu alia lingvo. La internacia lingvo estas bonege uzebla en

ĉiuj kampoj. Laŭ lia instruado kaj uzado de nia lingvo, li konvinkis min. Li pravis. Dum la du semajnoj en Poprad mia kredo pri Esperanto kreskis. Ni ankaŭ vidis la utilon de la lingvo en interkomunikado. Homoj el pluraj landoj renkontis kaj komprenis unu la alian.

La celo por Petro estis ke ni lernu Esperanton tiel bone kiel nian propran nacian lingvon. Tio estas ebla dum tri monatoj. Sed ĝi postulas laboron, volon kaj intereson. Kion oni volas oferi por lerni Esperanton? Tio estas la demando.

Sabate kaj dimanĉe ne estis instruado. Tiam ni ekhavis tempon por ekskursoj, i.a. nuntutan tagon vizitis Tatran montaron; la samo validis pri la nacia parko Slovaka Paradizo.

Estis multo por rigardi kaj travivi kune kun miaj geamikoj. La plej bonaj aferoj estis la afablaj sintenado kaj atmosfero dum kunesto. Se oni parolis al iu, oni ĉiam povis atendi agrablan respondon - laŭ lia/ĉsia scio de Esperanto. Ĉiu deziris la plej bonan por ĉiuj. Mi tutkore rekomendas Esperanto-kursojn en Poprad.

[Ni bedaŭras, ke ĉi tiu artikolo elfalis el n-ro 5/92 - Red.]

Aranĝoj en eksterlando

SAT-Amikaro estas regiona sekcio de Sennacia Asocio Tutmonda ("laborista") por la landoj franclingvaj. Ĝi aranĝos sian jarkongreson de la 9a ĝis la 13a de aprilo en Hérouville Saint Clair, apud Caen en norda Francio.

La Esperanto-klubo de Staszów, Pollando, invitas al Esperantaj Tagoj 27. - 30.5.

Printempa Semajno Internacia (PSI) de Germana E-Asocio. Feria semajno. Ĉefe por mez- aĝuloj kun aŭ sen infanoj. Kursoj, ekskursoj, slojdado, kantoj, ludoj, lumbild-prelegoj ktp. **9. - 16. aprilo**

Esperanto-Asocio de Estonio organizos internacian renkontiĝon en Tallinn de la 2a ĝis la 4a de julio.

Temaro:

1. Historio de la movado kaj agado
2. Problemoj de regiona agado por aktivigi la movadon
3. Estonio - la stato kaj perspektivoj
4. Ekskursoj.

Celoj de la renkontiĝo: laŭeble vasta aktiveco kaj parolpraktiko de ĉiuj partoprenontoj; konatiĝo de

la lando; aktiva feriado.

Partoprenkotizo 10 USD aŭ egalvalore. Pagado ĉe alveno. Invitiloj sendotaj. Limdato por aliĝo la 1-a de junio. Adreso J. Ojalo, Narva mnt. 9-5, EE0001 Tallinn.

Muzo - ĉiujara revuo de arta kreado. Ĉi-jare en Vilnius, Litovio 19. - 20. junio.

Konkursoj en branĉoj: prozo, poezio, kantoteksto, deklamado, diapozitivoj ktp. (Limdato por konkursaĵoj: 1. junio.) Aliĝo laŭeble frue.

Ĉeĥio. Post bonega reeĥo pri la antaŭkongreso '92 la ĉeforganizantoj invitas vin denove al Ĉeĥio por 8-tagoj restadoj:

Printempo 28.5 - 4.6
Aŭtuno 5.9 - 12.9
Ambaŭkaze 4-5 tagoj en Prago. La cetera tempo: printempe en Karlovy Vary (Karlsbad), aŭtune en folklora Moravio.

La prezo 795 DM inkluzivas 7 tranoktojn kaj duonmanĝigon en kvalitaj 3-stelaj hoteloj, rondvojaĝojn kaj bustransportojn, enirpagojn, amuzvesperojn k.a.

Rabato jam ekde 3-opa aliĝo.

KULTURA ESPERANTO FESTIVALO



KOPENHAGO, DANIO

Internacia komitato por etnaj liberecoj (IKEL) seminarioj en La Chaux-de-Fonds (Svislando) 19a (vespere) - 23a (matene) de julio:

Kio kaj kia estas etno? -
Kiuj rilatoj ekzistas inter etnoj kaj nacioj? - Ĉu oni denaske apartenas al unu certa etno? - Ĉu oni povas eksetnaniĝi? - Kio okazas en la balkana duoninsulo kaj en aliaj konflikto-zonoj? -
Kiun rolon ludas/ludu IKEL?

Internaciaj semajnoj apud Mediteraneo. Ankaŭ ĉi-jare okazos internaciaj semajnoj apud Montpellier:

1) 4. -11. sept. en haven-

urbo Sète, 30 km okcidente de Montpellier, en bela parko apud la maro.

2) 21. - 28. aŭgusto en Alpoj, 1100 super la marnivelo, meze de kamparoj kaj arbaroj, 25 km sude de Thonon.

Kursoj diversnivelaj gvidataj de eminentaj francaj geinstruistoj. Internacia etoso, banado, piedpromenadoj, ekskursoj, kantado, bona manĝo.

"Tre modesta restadokosto"; eblas tendumi proksime.

Aliĝoj kaj informoj: Centre Culturel Esperanto de Montpellier, 5 Rue du Docteur Roux, F-34000 Montpellier.

Baltiaj Esperanto-tagoj, regiono Cesis, Latvio. 9.7 - 17.7 Temo: Baltio kaj la mondo. Seminarioj, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, arta programo, filmoj, ktp.

ICEM-esperanto (Kooperativa Instituto de la Moderna Lernejo - Freinet-pedagogio) invitas vin partopreni en sia renkonto en Pardubice, Ĉeĥio 14a - 23a julio 1993. Petu pliajn informojn kaj aliĝilon ĉe Daniel David, 44 rue de Lens, F-59190 Hazebrouck.

PRI LA ĈI-SUPRAJ ARANĜOJ NI HAVAS PLI DA INFORMOJ EN NIA OFICEJO.

Vd. ankaŭ La Chaux-de-Fonds, p.15

Seminario

por la neregistaraj organizaĵoj

BRUMMUNDAL, 20.- 22.11.1992.

"Tar vi verdens fattige på alvor?" (Ĉu serioze ni konsideras la problemojn de la malriĉaj popoloj de la mondo?) La norvega nord-suda politiko proksimiĝe al la jaro 2000.

La seminario okazis iniciate de la norvega UN-asocio. Partoprenis entute 48 personoj, kaj NEL-n reprezentis Per Johan Krogstie.

Estis 5 prelegoj pri diversaj temoj koncerne la problemrilatojn inter Nordo kaj Sudo, kaj ekestis demandoj el la geaŭskultantaro.

La reprezentanto de NEL opiniis, ke en ĉiuj prelegoj, senescepte de norvegoj al samlandanoj, estis tro multaj vortoj kaj esprimoj en la angla lingvo, kaj pro tio li dum la debato diris:*

I den vestlige verden generelt er det nå slik at det engelske språk, og kun det, brukes i internasjonale relasjoner - også der dette språk ikke har noen hjemstavn, og godtfolk synes etterhvert å tro at engelsk er hele menneskehetens

*Por Esperanta traduko vd. p.3, ekde la 4a linio.

språklige fellesnevner.

Følgen av dette blir en stadig tilvenning til en anglofil, eller amerikanisert tenkemåte og livsstil, og gradvis mister særlig de mindre nasjoner sin egenart, sammen med at språket får så mange nye ord av engelsk opprinnelse inn, at identiteten går tapt.

Hvem er det som til syvende og sist høster alle fordelene av at en internasjonal kommersiell coca-cola-kultur blir innsneket i alle land og til alle etniske grupper og til alle individer?

Vi som er esperantister ser jo det forkastelige i dette, og mer enn gjerne vil vi snu denne bedrøvelige utviklingen ved å få folk til å endre tenkemåte, slik at man tar vare på sin egenart og bevarer den, samtidig som man er internasjonalt åpen ved hjelp av et språk som er fedrelandsløst og absolutt nøytralt.

Post tiu interveno ekestis tiel vigla diskutado, ke la seminargvidanto aranĝis pli detalan prezentadon de Esperanto kiel komunikilo en internaciaj rilatoj.

Ĉ 20 personoj partoprenis. Unue Per Johan Krogstie klar-

KCE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

La Chaux-de-Fonds, Svisio
(apud la franca limo).

Studseminario en la lasta
semajfino de ĉiu monato.
Paske (10. - 12. aprilo):
Migrado tra Ĵuraso.

Somerkursoj: Ĉiusemajne
inter la 6a de julio kaj la
14a de aŭgusto, por komenc-
antoj kaj progresantoj.

Aliaj kursoj:

Intensiva metodologia kurso
por instruistoj, Julio 9a -
17a. Gvidanto: Duncan
Charters.

Virinoj en la esperanto-

► igis pri la mondlingva
situacio ĝenerale kaj pri
Esperanto kiel efika ilo por
solvado de la problemoj. Li
montris videon pri la funkci-
ado de la neŭtrala mond-
lingvo, kaj el multaj demand-
oj kaj intervenoj evidentiĝ-
is, ke la sinteno al Esper-
anto estas pozitiva, kaj ke
la informoj atingis la celat-
aron, vekante ties intereson.

Listoj de la partoprenintoj
kaj de la prelegoj haveblas
en nia oficejo. [Red.]

► literaturo: Ĉu protagonist-
oj? Julio 10a - 11a. Gvidos
Giorgio Silfer.

Esperanto, lingvo,
lingvistiko, Julio 13a - 17a.
Gvidos Ilona Koutny.

Ekzamenoj de UEA/ILEI. Jul
17.-18. Pretiĝo eblas dum
la du antaŭaj semajnoj.

Lingvo en siaj socia,
kultura kaj psika kunteksto.
Julio 20. - 24., ĉefe
matene. Gvidos Ilona
Koutny.

Sociologia aliro al la
esperanto-movado. Julio 20.
24., ĉefe posttagmeze.
Gvidos Zbigniew Galor.

Etnismo - fundamenteroj,
problemoj kaj perspektivoj.
Uwe Joachim Moritz, Daniele
Vitali, k.a. Julio 19. - 23.

La idealo de Zamenhof.
Aŭgusto 3. - 7. Gvidos
Francois Degoul.

Esperantistoj: Ĉu kvazaŭ
etno? Aŭgusto 3. - 7. Gvidos
A.S. Melnikov.

PLIAJ INFORMOJ EN NIA
OFICEJO.

Kompleta programo havebla p
sendo de simpla poŝtkarta
peto la KCE, Poŝtfako 779,
CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

Minoritataj lingvoj en Nordeno

Raporto pri seminario: Minoritataj lingvoj kaj popoloj en Nordeno kaj lingvoproblemoj en Eùropo.

Nordena Popola Altlernejo, Kungälv, Svedio, 30. okt. - 2. nov. 1992.

En Nordeno estas parolataj multaj lingvoj: germana, dana, nordfrislanda, feroa, groenlanda (inutsitut, kalallit), sveda, sudsamea, lulesamea, nordsamea, skoltesamea, norvega; kaj laŭnorma sed ankaŭ tiel nomata novnorvega, finna, karela, tornevalfinna, rusa, romani, jida, tatara, islanda, por mencii la lingvojn kiuj estas uzataj dum pli ol cent jaroj en niaj landoj.

Aldone venas ĉiuj lingvoj parolataj de la enmigrintoj en nia nuntempo, kiuj alvenas nian nordan parton de Eùropo.

Tiurilate Ulf Telemann, profesoro en universitato de Lund diris:

Dum la lastaj jardekoj sekvis káj ideala káj politika ofensivo por la lingvoj de la malplimultaj grupoj, samtempe kiam efikis la tielnomata verda ondo kun kreskanta intereso por discentrigo kaj aŭtonomeco.

La sekvo de tiu batalo estas bonfavoro kaj sukceso por la minoritataj lingvoj kun fundo en certaj teritorioj, en unua vico la feroa kaj la groenlanda,

ĉar iliaj koncernaj hejmaj regionoj atingis aŭtonomecon en 1948, respektive en 1979."

Por doni okazon konatiĝi kun la lingva situacio en Nordeno, sed ankaŭ cetere en Eùropo, okazis seminario pri tiu temo en Kungälv fine de oktobro. La ĉefaj aranĝantoj estis la Nordenaj Esperanto-asocioj, Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo, kaj la Samea Societo de Gotenburgo. En la seminario partoprenis ĉ. 50 personoj el la jenaj landoj: Svedio, Islando, Finnlando, Germanio, kaj estis ankaŭ partoprenantoj el Belgio kaj Francio.

El Norvegio venis:

- Olav Bjørnsrud, Kongsberg
- Sunfloro Birkeli, Sauda
- Catarina Utsi, Majavatn
- Per Johan Krogstie, Løten

Pro la raportantoj kaj la gepartoprenantoj sen scio de la internacia lingvo, ĉiuj prelegoj kaj debatkontribuoj kiuj okazis en Esperanto estis buĉstradukataj al la sveda. Simile ĉio kio estis dirata svedlingve estis tradukata al Esperanto.

Enkonduke kaj superrigarde

Lars-Øivind Liljeström informis pri la malplimultaj popolaj grupoj en Nordeno, kaj poste li klarigis pri la situacio inter la arktaj popolaj gentoj, sameoj kaj eskimoj.

Okazis prelegoj pri la jenaj temoj:

La samea kulturo - de Johannes Marainen, prezidanto de la Samea Societo de Gotenburgo.

Lingvoproblemoj en Eŭropo - solva propono - de Michael Cwik el la Eŭropa Parlamento en Brusel.

La vojaĝantoj (tatroj) en Norvegio kaj en aliaj Nordenaj landoj, - de Per Johan Krogstie, la prezidanto de Norvega Esperantista Ligo.

La islanda, nia komuna pralingvo Nordena, - de Baldur Ragnarsson el Reykjavík.

La feroa lingvo kaj ĝia kulturo estis prezentitaj de Birgitta Hylín, reprezentantino por la Sved-Feroa Asocio.

UNESCO kaj ĝia protekto de minoritatoj - de Göran Michanek, reprezentanto por UN.

"Monda Kunagado" kaj UNESCO - kio komuna estas? de Ulrich Becker el Berlin.

Lernolibro pri Esperanto en la samea - propono de Ann Wagner el Paris.

Nordena Konsilantaro kaj la Societo Nordeno - ilia signifo por la minoritataj

popoloj, iliaj lingvoj kaj kulturo - de Heli Henriks-son-Vasara, reprezentantino de la Societo Norden.

Kion signifas la lingvo kaj la propra kulturo por la identeco de homo? - de Jukka Pietiläinen el Tampere, Finnlando.

Ĉu Esperanto povas esti minaco kontraŭ la malgranda lingvoj? - de Ebbe Vilborg.

Aldone al ĉiuj prelegoj estis okazo starigi demandojn, cetere sekvis diskutado.

Estis ekskurso al Bohus, al tiea ekspozicio pri la samea kulturo en samea tendo apud lageto en la arbaro.

Dum ĉiu vespero estis agrabla kaj socia kunestado, precipe konsiderinde estis ke Catarina Utsi el Majavatn kantis sameo-kanzonojn laŭ propra gitar-muziko, pro kio ŝi rikoltis viglan aplaŭdon.

Olav Bjørnsrud donace transdonis al la lernejo memtekstitan murtapiĝon, kaj li informis pri planita faktortaro pri teksado.

Per Johan Krogstie montris videon kies titolo estas: Sur la suna bordo de lago Mjøsa.

Je la fino de la absolute bonsukcesa aranĝo la motoro de la tuto: Märtha Andreasson, estis laŭdata kaj honorata per poemo en Esperanto, verkita kaj laŭtlecita de Baldur Ragnarsson.

Per Johan Krogstie

Norvega Kroniko

OKCIDENTA DISTRIKTO

Jarkunveno: Dum la aŭtuno -92 montriĝis malfacile kunigi la samideanojn el la okcidentaj kluboj. Tamen la jarkunveno okazis fine, en Bergen, kun partoprenantoj el Bergen kaj Haugesund. La 7an de novembro oni kolektiĝis. La raporto por la lastaj du jaroj montris aktivecon en la kluboj - tre multaj membroj ja partoprenis en la UK en Bergen, kaj fervore helpis en tiu aranĝo.

La nova estraro, kiu ankaŭ dum la venonta du-jara periodo sidos en Bergen, konsistas el: Ingebjørg Rambjør (prez), Anne Karin Bondhus (vicprez.), Eli Fitjar (sekr.), Agnar Fitjar (kas.) kaj Trude With (ano).

Estas la intenco jam printempe kunvoki la distriktajn klubojn por neformala kunestado, por inspiro kaj utilo.

Rap. Elna Matland

La distrikto aranĝos neformalan renkontiĝon (krets-samling) en Stord 17.-18. aprilo.

BERGEN

KURSO kun STEFAN MACGILL

De la 23a ĝis la 25a de oktobro okazis en Bergen - en la Esperantoklubo - kurso por progresintoj, kiun gvidis Stefan MacGill.

Li uzis sian propran lernolibron, la duan kajeron de "Tendaraj Tagoj", instrua kaj humura libro kun aktualaj, utilaj tekstoj.

9 klubanoj partoprenis kaj travivis interesajn lecionojn kune kun la tre sperta, vigla kaj pacienca instruisto.

Sabaton vespere la partoprenantoj, kune kun Stefan, kolektiĝis en la hejmo de Eli kaj Agnar Fitjar, en bona Esperanta etoso.

Raportis Elna Matland

La Esperantoklubo de Bergen havis sian tradician antaŭkristnaskan festkunvenon la 10an de decembro. Ges-roj Fanebust afable kaj gasteme malfermis sian hejmon por la klubanoj. Ni estis 15 kiuj pasigis kelkajn horojn en agrabla kaj festa atmosfero.

La prezidanto Ingebjørg Rambjør prizorgis ke ni sendu kristnaskajn salutojn per belegaj kartoĵoj al membroj kiuj estas malsanaj, aŭ loĝas fore, kaj al la aliaj kluboj en Okcidenta Distrikto.

Elna Matland faris paroladeton pri Kumbel, la fama dana Gruk-poeto. Cetere oni aranĝis ellotadon, kion la klubo faras nur en la antaŭkristnaskaj kunvenoj. La sumo tiel kolektita, kr. 314, ni donos al la esperantistoj suferantaj en Jugoslavio. Ni sendos la monon per nia ĉefdelegito Kjell Gustavsen kun la indiko "espero," kaj ni admonas al aliaj esperantokluboj sekvi nian ekzemplon.

Elna Matland

La klubo kunvenis la 16an de decembro. Nia nova samurbano Kristján Eiriksson montris al ni tre interesan gazeteton, La Tradukisto, kiun oni eldonas en Islando. Ĝi estas kvarmonata, kun tradukoj en Esperanto kaj en la islanda, kaj la verkistoj uzas Esperanton kiel pontlingvon. La gazeteto estas abonebla por 50 n.kr. jare. Elna Matland prezentis novaĵojn el la Esperanta mondo. Ĝi ankaŭ prezentis la ekologiisman gazeton "VERDire", redaktatan en Tromsø, kun aktualaj artikoloj kaj alia interesa enhavo.

[Raportis Elna Matland

La klubo jarkunvenis la 18an de januaro. La jarraporto montris grandan aktivadon, regulan kunvenadon kun interesaj programoj kaj ankaŭ lingva ekzercado. La membroj vigle partoprenis la kunvenojn, kaj ankaŭ vojaĝis eksterlanden - menciinde estas ke 7 membroj de la klubo ĉeestis la kongreson en Vieno. La klubo ankaŭ aranĝis ekskurson printempoj kaj seminarion semajnfine kun Sefan MacGill kiel preleganto.

Kelkaj membroj malsaniĝis, kelkaj forpasis, kaj la estraro nun planas novajn iniciatojn por varbi pli da membroj.

La elektoj donis la jenan rezulton: prez. Ingebjørg Rambjør, vicprez. Anne Kar Bondhus, sekr. Eli Fitjar, kas. Agnar Fitjar, ano Trud With. Anstataŭantoj: Lilly Davanger, Svanhild Nese kaj Solveig Fanebust. Revizoro Asbjørn Iversen, kontaktulo por amaskomunikiloj: Elna Matland. Studgvidanto Elna Matland. Nova elekta komisiono: Elna Matland kaj Edvin M. Akerø.

La klubo kunvenas ĉiun trian lundon [de la monato?] en Bydelshuset, Møhlenpris, kaj renkontiĝoj en kafejo Ervingen okazas ĉiun unuan lundon posttagmeze.

Raportis Elna Matland

Margit Tøsdal

La 12an de januaro forpasis Margit Tøsdal, membro de la Esperantoklubo de Bergen.

Margit estis ĉirkaŭita de esperantistoj dum sia kreskado. Ĝi naskiĝis en Os, la vilaĝo kie ankaŭ loĝis Hal-dor Midthus [pioniro de la norvega Esperanto-movado - Red.]. Kaj la patro de Margit kaj ankaŭ la najbaroj parolis Esperanton, sed Margit mem komencis lerni la lingvon serioze nur dum siaj lastaj jaroj.

Pro sia granda sperto, Margit Tøsdal estis membro de la norvega parlamento dum multaj periodoj, ĉi havis grandan scion, de kiu ankaŭ la esperantomovado povis profiti.

Dum la UK en Bergen, Margit havis la grandan taskon gvidi la Nacian Vesperon, kaj ĉi tre bone plenumis la taskon.

Margit ankaŭ planis kaj antaŭvidis partopreni la UK-on en Vieno lastjare, sed bedaŭrinde, nur la lastan tagon antaŭ la forveturo, ĉi devis malmendi la partoprenon pro malsano.

Paco al ĉia memoro!

Ingebjørg Rambjør

LA NORDA STEL- HAMAR

Den 26. novembro Per Johan Krogstie donis prelegon pri Esperanto en la Rotariklubo de Alvdal. Ĉeestis ĉ. 20 membroj. El la diskuto li konstatis pozitivan sintenon.

La Norda Stelo jarkunvenis la 27an de januaro, kaj jen la rezulto de la elekto:

Prez.: Egil O. Larsen, vic-prez.: Kjellaug Austad, sek. Kåre Bye, kass.: Jon Martin Alnes, estraraninoj: Ragnhild Alnes kaj Solveig Stensby, geanstataŭantoj: Ole Danbolt kaj Eva Rennemo, revizoroj: Bjørn Carlsen kaj Odd Renne

MARA VENTO HAUGESUND

MARA VENTO okazigis la unu-kunvenon postsomeran en oktobro. La programo temis pri la interesa kaj plaĉa busvojaĝo al la UK en Vieno kiun aranĝis la klubo de Bergen. Pri vojaĝtravivaĵoj, impresoj kaj spertoj rakontis O.J. Rønnevig kaj Steffan Kjetland. En la rakontadon ili enplektis impresojn ankaŭ pri vizito en la slovaka ĉefurbo Bratislava kaj unutaga postkongresa restado en Budapeŝto. Dum la manĝopaŭzo

diligentaj fotintoj montris
aron da vojaĵfotoj el la
respektivaj landoj.

oto

Tio estas la lasta raporto de
"oto" = Olav Thormodsen. Li
mortis subite la antaŭ-
vesperon de kristnasko. Vd.
nekrologon sur p. - Red.

OSTO

Else Bugge-Paulsen fariĝis
90-jara ĉi tiun tagon. La
festparoladon por la jubil-
anto faris C. Støp-Bowitz. Li
priparolis ĉsian membrecon en
la klubo ekde 1993, ĉsiajn
multajn oficojn en ĉgi kaj en
la Eldonejo, kaj ĉsian invit-
adon St. Johanovespere al la
klubanoj veni al ĉsia somer-
domo ĉce Tyrifjordo. Fine li
kore gratulis ĉsin en la nomo
de la klubo kaj de la tuta
norvega esperantistaro.

Gesinjoroj Rømmesmo verkis
kanton, honore al la jubil-
anto, kiun la ĉceestantoj
kantis.

Partoprenis ankaŭ du litovaj
gastoj - gefratoj - el
Vilnius. Post prelegeto pri
la historio kaj nuntempo de
Litovio kaj ties Esperanto-
movado ili kantis kelkajn
litovajn kantojn, kun propra
gitara akompano.

Odd Kolbrek

La 18a de januaro.

La prezidanto bonvenigis,
speciale al nia gasto el
Argentino, Atiljo Orellana
Rojas, kiu, post iom da
diskuto pri Kluba Bulteno,
faris vere interesan
programon pri la antaŭtempaj
kulturoj de la indianoj en
Sud-Ameriko - speciale tiu de
la inkaoj. Li priparolis la
historion de ĉci tiuj
kulturoj, la muzikon - blov-
instrumentan, la dancojn kaj
la kantojn - cetere plej
multe dediĉitajn al ilia
diservado.

Pere de sonbendo li prezent-
is pratempanj melodiojn kun
kantoj - kaj li priparolis la
vivmanieron de la indianoj,
ankaŭ kiam la blankuloj venis
al Sud-Ameriko. Fine li
respondis al demandoj de
kelkaj el la ĉceestantoj.
ĉCeestis 17 membroj kaj 1
gasto.


Raportis Odd Kolbrek

ALILOKE

80-JARA iĝis Erik Bjerkaas,
Harstad, la 12an de novembro.
Li estas membro ekde 1938. Ni
gratulas!

ALIĜILO

por la landa kongreso de NEL 1993
(Norvega Esperantista Ligo)



de 28a - 31a de Majo 1993, Sarpsborg
Kongresejo: Skjeberg Folkehøyskole

Postgira konto: 0805 2070407, Rolf Bergh,
(La Urso), Syrinveg 12, 1711 SARPSBORG

Mi/Ni aliĝas al la NEL-Kongreso 1993, kaj ensendas samtempe al la LKKA ĝirkonto la kotizon 50.- + la fiksitan antaŭpagon 100.- kronojn por ĉiu persono. La restsumo estos pagenda surloke je la alveno. / Kongressgebyret kr 50.- + forskuddsbeløpet kr, 100.- pr. person, skal innbetales samtidig med påmeldingen. Restbeløpet betales ved ankomsten til kongresstedet.

Familia nomo

Antaŭnomo

S-ro

S.ino/P-ino

Infano(j): Aĝo(j)

Adreso: Strato/N-ro

Poŝtkodo

Poŝtloko

Ensendita sumo por persono(j)

Kr

Alveno al / Ankomst til

per

antaŭvidita je la

Sarpsborg stacio kongresejo / trajno aŭto / dato horo

Mi / Ni partoprenos la tutan kongreson - partoprenos ĝis

Jeg/Vi deltar i hele kongressen - deltar til (dag/tid)

B. v. skribi la prezon de la vojaĝbiletoj - iro kaj reiro / Pris for tur og retur-reisebillett:

Trajno Aviadilo Omnibuso Ŝipo

Kongreskostoj / Kongressbeløp

La kostoj (tranoktado + ĉiuj manĝoj) estas de vendrede (vespermanĝo), la 28an de Majo ĝis la tagmeza manĝo dum la 2a Pentekosta tago, la 31a, por ĉiu persono. / Fullpensjon fra aftensmat fredag, 28. mai til lunsj 31. mai er pr. person:

- Restsumo (Minus antaŭpago / Fratrukket forhåndsbetaling) Kr. 500.
- Infano ĝis la 10a vivjaro (Barn inntil 10 år) senpaga
- " " 10 - 16 jara (" 10 - 16 år) 50 % rabato

Subvencio al vojaĝkostoj

Al partoprenontoj, kiuj pagos pli ol 800.- kronojn por vojaĝo, iro kaj reiro, en trajno ("dormlokoj" ne inklusive), omnibuso, aviadilo aŭ ŝipo, estos repagata la diferenco inter 800.- kr. kaj la faktaj vojaĝkostoj. Pro ekonomiaj kaŭzoj, tiu subvencio bedaŭrinde devas esti limigota supren je 600.- kronoj. Kondiĉo por partoprenontoj de Trondheim, Bergen kaj Stavanger estas uzo de trajno.

Reisestønad

Deltakere som betaler mer enn 800.- kr. for reise i tog (soveplass ikke medregnet), buss, fly eller båt, tilbakebetales differansen mellom 800.- kr. og de faktiske billett-kostnader. Av økonomiske grunner må stønadsbeløpet begrenses oppad til 600.- kroner. Deltakere fra Trondheim, Bergen og Stavanger forutsettes bruke tog.

La kongresejo

La Skjeberga Popola Altlernejo situas 10 kilometrojn de la urba centro de Sarpsborg. Estas du gastlernejoj, ĉiu kun 16 dulitaj cambroj, kiuj estas parope aranĝitaj kun necesejo kaj duŝo inter ili. Cetere estas ĉambroj en la ĉefdomo kaj en alia domo. Unulita ĉambro ne povos esti ofertata al ĉiuj.

La lernejo donas bonajn eblecojn por kunvenoj kaj aktivecoj. Tie estas aŭditorio, gimnastika halo, granda manĝo-salono kaj aliaj salonoj.

Apud la lernejo estas konata rokogravuraĵo.

Møtestedet

Skjeberg Folkehøyskole ligger 10 km fra Sarpsborg sentrum. Det er 16 dobbeltrom i hver av de to internatbygningene, parvis ordnet med dusj og WC i mellom dem. Videre er det noen rom i hovedbygningen og i en tilstøtende. Alle kan ikke påregne enerom.

Skolen gir gode muligheter for møter og aktiviteter. Den har auditorium, gymnastikksal, stor spisesal og salonger.

Ved siden av skolen er det et helleristningsfelt.

Ekskurso(j) / Utflukt

Pri ekskurso (pagenda surloke) oni revenos. Opplysning om utflukt senere.

Novaj informiloj en Esperanto

En esperanto pri Trento

Trenta Esperanto-Grupo (Norda Italio) skribas al ni i.a. ke "nia asocio sukcesis konvinki la Agentejon de Turisma Promocio de la Trenta Regiono publikigi du tre belajn broŝuretojn pri vintra kaj somera sezonoj, nature en Esperanto. Niaj argumentoj estas: Esperanto povas helpi ankaŭ en turismaj kaj komercaj aferoj.

Por montri ke tio estas vera, necesas ke multaj esperantistoj petu la broŝuretojn, kiujn oni ekspedos al ili senpage fare de: Azienda di promozione turistica del Trentino, I-38100 Trento, Via Sighele 3 La broŝuretoj povos esti utilaj ankaŭ en renkontoj, seminarioj, kongresetoj..."

Antwerpen: kultura ĉefurbo de Eŭropo en 1993.

Okaze de tiu honorigo oni eldonis belan informan faldfolion pri Antverpeno - en Esperanto. Ni havas kelkajn ekz. en la oficejo. De la 16a ĝis la 23a de julio (semajno 29) oni aranĝos Internacian Kulturajn Semajnon.

Kotizoj de NEL

En 1993 la kotizoj de NEL restos senŝanĝaj. Por rekta membroj ili estas:

ordinaraj -	120 kr.
junulaj -	75 kr.
familiaj -	35 kr.
junaj familiaj -	15 kr.
subtenantaj -	170 kr.
dumvivaj -	1600 kr.

Pageblaj al NEL, poŝtĝiro 0803 5100300.

Klubaj membroj informiĝu ĉe la koncerna klubo. (La kluboj transsendu al NEL por ĉiu membro respektive 110, 65, 35 kaj 15 kr. por la supraj kategorioj.)

*

Laŭ la statuto de NEL oni antaŭpagu la kotizon. Pro tio ni forte instigas al niaj karaj membroj pagi sian kotizon kiel eble plej rapide. Tiel vi ankaŭ multe helpos nin, ĉar tiam ni ne bezonos uzi tempon kaj monon por urĝigaj leteroj. Dankon!

KPH

PA NORSK

Vennligst betal kontingenten så fort som mulig. Da sparer du oss for ekstraarbeid med purringer. Girokort er vedlagt for direktemedlemmer.

Novaj libroj ĉe la Eldonejo

Boris Kolker: Vojaĝo tra Esperantolando. Studlibro laŭ literaturaj tekstoj. Moskvo, 1990. 340 p. Ĉ. 100 kr.

La bona mesaĝo de Jesuo laŭ Marko. Nova traduko de Gerrit Berveling. Kun enkonduko kaj piednotoj. 1992. 64 p. 47 kr.

Simile la tri ceteraj evangelioj (Mateo 84 p., Luko 90 p., Johano 90 p.) Po 47 kr.

Andrzej Pettyn: Esperanto en dialogoj. Lernolibro. Sur ĉiu paĝo unu frazostrukturo por plenigo per elekteblaj vortoj aŭ frazeroj. Warszawa 1990. 420 p. 66 kr.

Kajto. Muzikkasedo. 86 kr.

PENETRE TRA JARCENTOJ estas la titolo de anekdotaro pri famuloj, kolektita de K. Ĥĉurek, kompostita en Jugoslavio, eldonita en Finnlando en 1991, kaj presita en Tartu, Estonio. Ni ricevis grandetan stokon de vizitantoj el Tartu. La kajeron, 70-paĝan en formato A5, ni vendadas por 25 kr. enspeze al la estona movado.

DD

dudek kvin

Abonu aliajn revuojn!

La superrigardo de la internaciaj kaj eksterlandaj revuoj ne povis aperi en n-ro 6/92, kaj nun jam pasis la tempo por (re)aboni. Sed la prezoj de la plej aktualaj troveblas tie (sur p. 2), kaj ni nur aldonu:-

VERDire ankoraŭ bezonas plian centon da abonantoj, ĉar la redaktoro kovras el propra poŝo la deficiton. (Pagu 80 kr. al poŝtĝira konto 0540 8253863, por ricevi 4 numerojn.)

Bulgara Esperantisto havas plurajn rubrikojn kun internacia intereso: Originala verkaro, Esperantologio kaj interlingvistiko, Distra paĝo. Jarabono 130 kr. al la Eldonejo (kontonr. vd. p.3).

UNUEKZEMPLERE RICEVITAJ

Poemoj de Armand Su. Pekino 1992. 18 cm. 158 p.

Ĉinaj mitoj. Reverkita de Yuan Ke. Pekino 1992. 18 cm. 96 p.

aj ni intencis diskuti, [^]cu generaligi ĝin. Sed ni forgesis unu aferon: demandi la aranĝanton. Ni do ne alvokis Rolf Bergh al tiu kunveno.

Sed Rolf Bergh [^]ceestis la estrarkunvenon la 11an de Januaro 1993. Li antaŭvidis gravajn praktikajn problemojn realigi la proponon, ekz. kiom oni repagu al 4 homoj, kiuj veturus per 1 aŭtomobilo el Trondhejmo? Kvankam mi klarigis, ke eventualan deficiton pagu NEL, ne la aranĝanto, Bergh informis, ke se NEL ne [^]sanĝos la decidon praktiki la supre skizitan sistemon, li devos retiriĝi el la aranĝo. Tio verŝajne ne signifus, ke la kongreso ne povus okazi en Skjeberg, sed ja signifus, ke iu alia devus rilati kun la lernejo. Sekve la plimulto el la estraranoj voĉdonis por [^]sanĝo de la decido. Pri la validaj aliĝkondiĉoj vi do legu aliloke en [^]ci tiu numero.

Tamen la intencoj de mia propono realiĝas en du aspektoj: Unue, ni decidis parte subvencii vojaĝkostojn laŭ tabelo, kiun vi ankaŭ trovos aliloke en [^]ci tiu numero. Due, ni decidis, ke la Landa Kunveno diskutu la principon de egaligo de la vojaĝ-elspezoj, surbaze de

la artikolo, kiun vi nun legas.

Eblaj sekvoj

Ne estas antaŭvideble, kiel la membroj reagas, se ni ekpraktikus la egaligon. Eble iuj proksim-loĝantoj bojkotus la kongreson, trovante maljuste, ke ili pagu tiom por tiom mallonga vojaĝo. Eble la periferiuloj ne aliĝus malgraŭ la favoraj kondiĉoj; aŭ eble ili aliĝus tiom amase, ke ili endanĝerigus la ekonomion de NEL. Sed en tiu kazo ni povus esperi pli aktiva movado en la periferioj, do [^]cu la ekonomia perdo povus esti konsiderata kiel investo? La diskuton pri tiu problemaro ni ne povos realigi, apogante nin sur spertoj - kiel mi esperis -, sed kvankam la diskuto baziĝos nur sur hipotezoj, mi esperas, ke [^]gi estos sobra kaj fruktodona. Tia [^]gi certe estos, se la membroj bone preparos sin kaj - kial ne? - uzos ankaŭ nian gazeton por debati.

Otto Pryt

PA NORSK:

Styret har vedtatt en delvis reiseutjevning for landsmøtet i år (se s.). Et tidligere vedtatt forslag som innebar fullstendig reiseutjevning, ble omgjort, men prinsippet skal opp til diskusjon på landsmøtet.

Olav Thormodsen in memoriam

Kun konsterno ni aŭdis la novaĵon pri la morto de Olav Thormodsen. Li mortis Kristnaskovesperon 1992. Li iĝis 82-jara.

Dum multaj jaroj li estis nia gvidanto, kiu senĉese batalis por ke nia klubo daŭre funkciu. Kaj li bone sukcesis. Lia gajeco kaj bona humoro kolorigis niajn klubkunvenojn. Nun li ne plu estas inter ni! Ke li havis pli ol 80 jarojn tute ne montrigis. Lia vigleco tute kaŝis lian aĝon. Kaj li vigle laboris por sia kara Esperanto ĝis sia lasta jaro.

En la jaro 1934 venis Esperanto-instruisto al Haugesund. Thormodsen partoprenis lian unuan kurson. La lingvo kaj ĝia interna ideo tute kaptis lin. Li sincere kredis ke ĉi tio estas rimedo por solvi la problemojn de nia eterne militanta mondo. Dum la sekvantaj jaroj li perfektigis pri la lingvo. Baldaŭ li mem instruis.

Renkontate en la strato li ĉiam parolis Esperanton, kaj iom post iom ĝi iĝis natura lingvo inter ni - netaksebla ekzerco en la lingvo.

Thormodsen estis ĵurnalisto kaj dum multaj jaroj ankaŭ instruisto. Eĉ kiel pensiulo li ofte skribis por la urba gazeto. Kaj li estis multjara membro de urba kant-horo.



Dum sia riĉa kaj kolorplena vivo li vizitis multajn landojn kaj preskaŭ ĉiujn Universalajn Kongresojn ekde 1948. Lia lasta estis en Vieno lastjare. Venontan someron la UK okazos en Valencio. Sed tiam oni vane serĉos lin. La idealisto kiu dediĉis sian tutan vivon al Esperanto forestos.

La multaj amikoj de Olav Thormodsen ĉiam portos en siaj koroj karajn memorojn pri li.

Restu en paco, bona amiko!

Amikoj en "Mara Vento"

En ĉiuj lernejoj tutmonde?

Kion ni faru por ke nia lingvo baldaŭ estu instruata en ĉiuj lernejoj tutmonde? - Informas: S-ro André Grossmann, 5 rue des Pyrénées, F-68390 Baldersheim. (Bv. sendi koverton kun via adreso kaj 2 francaj poŝtmarkoj je 2,50 F aŭ 2 internaciaj respond-kuponoj.

[pagita anonco]

26-jara esperantisto-kemiisto deziras amikiĝi kun norvegaj junaj klerulinoj por familiareco. Adr. Cihangir mh. Namik Kemal cd. Sirin sk. 29, mekt. kut. 6, Avcilar, Istanbul, Turkio.

[Pagita anonco]

La Pacocentro Kornhaug

kie NEL estas unu el la 17 organizoj kiuj konsistigas la konsilion, bezonas helpon de bibliotekisto aŭ arkivisto por arkivi historian materialon pri la aktivado de la norvega pacmovado tra la jaroj. Oni ne povas oferti salajron, sed jes senpagan loĝadon en Gausdal. Tlf. 062 20964.

Gravas skribi al la E-radiostacioj!

Post kiam Svisa Radio ĉesigis sendi siajn Esperanto-programojn lastjare, ili ofertis kiel anstataŭaĵon (konsolaĵon?) kasedoservon. Sed finfine ili ricevis nur 40 mendojn de la kasedoj, do konkludis ke la intereso ne estas sufiĉe granda por pravigi la penon. Jen denove memorigo, ke gravas skribi al la radiostacioj. Vd. tabelon de ondolongoj kaj adresojn en Norvega E-isto n-ro 5/92, p. 18-19.

Solvo

La virina triopo

La konkurso (paĝo 12) en n-ro 5/1992 temis pri tri virinoj prezentitaj per poŝtmarkoj. Ĉiuj norvegaj partoprenintoj trovis 1) Käthe Kollwitz, 2) Princino Grace de Monaco, 3) Hanna Winsnes. La eksterlandanoj havis problemojn pri Hanna Winsnes. Gajnis la konkurson s-ino Kirsten Ek, Oslo, kiu ricevis skrapbileton kiel premion. Ni gratulas!